GISTO, JAN, 07
G.O.Vaske
Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

.....

PLEJ FIDELA

Post kalkuli la nombron de la cheestlisto en la jaro 2006 konstateblas ke la tri rondanoj kiuj plej fidele trinkas Verdan Kafon estas nia diligenta GEA-sekretariino Elizabeth, kiu 11 fojojn alkuris post kiam sxi finzorgis aferojn en la GEA-sidejo; Duan lokon okupis nia sxercema amiko Zaghetto, per 10 cheestoj; trian, per 9 fojoj signaturinta la liston, estas nia diligenta profesoro Solon, ne kalkulinte la 12 signaturojn far la lokomotivo...hi...hi...!

VERBO LOTI

Chu gxi estas transitiva aù netransitiva? Same, la verbo manki, chu tr. aù ne-tr.? Kiam oni legas tekstojn, sufichas atente observi la karakterizon de tiuj verboj kaj ne bezonas konsulti vortaron por sciigxi, se la verkinto eraris aù ne.

VI, CHU DILIGENTA AÚ PIGRA?

Diligentuloj sukcesis sxteli tempeton el sia okupiteco, por leteri al lia papa mosxto, rilate al lia saluto adresita al la tuta mondo, per kelkaj vortoj ankaù en la internacia lingvo. Se vi aùskultis lian benon okaze de la jarsxangxo, vi certe ne aùdis la salutvortojn niafavorajn kiujn diradis lia antaùulo, bedaùrinde. Do indas stahhanovi kaj respektoplene pinchi liajn flankojn.

IDEO

De pluraj jaroj mi kovas la ideon instigi GEA-anojn, kiuj povas pasigi almenaù unu semajnon che mara plagxo, kuragxe prezenti fulmokurson de Esperanto al la amaso da homoj tie kolektigxintaj. Entrepreno sen granda elspezo. Mi bildigas la aferon jene: sufichus distribui, du aù tri tagojn antaùe, invitilojn (xerox) montrante tagon, horon kaj difinitan lokon kie la homoj povos konatigxi kun la mirinda strukturo de nia lingvo per fulmokurso, laùtvoche kaj/aù skribite sur antaùpreparita kajero el grandaj paperfolioj. Gxi estu teksto facile komprenebla.(Prefere kun multaj vortoj el nia nacilingvo). Samtempe la legantoj konatigxos kun la verboj, prepozicioj, afiksoj, ktp oportune menciataj de la prezentanto.Laù mi, elstaruloj, kapabluloj devus surdorsigi la “pianon” apogitaj de laùeble pluraj gesamideanoj. Chu la ekzemplodona geo Zaghetto estu indikita? Kial ne, se eblos? Chu ni disponas pri alia paro same oportuna? La geZaghettoj estas simpatiaj junaj personoj, belaspektas kaj li, sufiche sprita homo, eble havos okazojn iomete amuzi la spektantojn per siaj vortludoj...per sia gestolingva lekcio, ktp.Tio igas la prezentadon neforgesebla. Do karaj, bv ne vendi viajn E-kapablon tro multekoste! Nia juvelo Esperanto atendas oferojn, por ne daùre stagni kaj sximi. Kandidatigxu tuj, por ke ankoraù chi-jare eblos provi la rezulton dum la plej varmeta maro de februaro kaj marto. Kredas mi ke la ceteraj gaùchaj gesamideanoj estigos stakon da realoj, por realigi la lanchon de

chi eksperimenta ideo far la GEA-anaro kaj aliaj fervoraj idealistoj kiuj helpos orumi la pilolon, kun defio al kleruloj, ke ili menciu pli regulan lingvon en la mondo, se ili kapablos - Aldone mi proponas tuj opinii pri la ideo. Lasu iom el viaj sxparajxoj petoli!

PILOJ/BATERIOJ

Finfine organizajxo proponis sin kolekti eluzitajn pilojn k bateriojn por doni al tiu chirkaùmedio noca rubo adekvatan destinon: la reuzadon. Tiucele Banko Real disponigos ujojn flanke de siaj elektronaj kasoj, por kolekti la uzitajn pilojn kaj bateriojn. Laù mia sugesto, en miaurba jxurnal-kolumno, konsciaj homoj kolektis ilin en skatoleto gxis ekzistos ekologia solvo. Mi esperas ke chiuj konsciaj samideanoj jam faris same kaj nun povas liberigi sin de la gxena rubokonservado.

ENIGMOJ

Far Boris Kolker falis en miajn manojn tekstoj rilataj al la unuaj tempoj de Esperanto, okaze de la chesigo de E-elsendoj de Pola Radio. La pretekston motivas manko de sufichaj leteroj de samideanoj, adresitaj al tiu Radio tamen duonpruve oni konstateblas rasismo kontraù la judideco de Zamenhof...? chu?

AÙKCIO AÚ LOTO

Jen oportuna sugesto, favora al nia GEA, kiu daùre montras rugxan avertilon. Anstataù ol flankenmeti legitan, legindan libron aù revuon, kie polvo kaj forgeso enterigos gxin, kial ne kunporti al VKafo kaj aùkcii aù lotumi la utilajxon? Prezo de la komenca propono estu difinita (ne alta) de kiu ofertas la objekton, depende de gxia valoro. Pravigo: revuo-abonado multekostas, pluraj homoj povos amuzigxi per la legado de unu sama ekzemplero kaj GEA dankos la VK-rondanojn.

GISTO

Monaton marto/07 chi oldulo atingos la agxon kiam 90% de la grizuloj decidas elfenestrigi sian mangxilaron. Malmulte mi sukcesis kontribui por pliverdigi Esperantujon. Plej bedauros mi, se neniu el la gaúchaj gesamideanoj decidos sursxultrigi la taskon daùrigi la eldonadon de chi legajxo. De tempo al tempe mi sentas doloreton sub la liva riparo. Miaj knaboj scias marsxi laù la direkto de iliaj nazoj. Sen mi, nenio granda perdo okazos. Do plachus al mi, se la samideanaro lante envicigxus por difini, kiu zorgos por ke nia VK-amikaro ricevu chi bultenon, por teni la E-scion gxisdata. Elspezoj, posxta kaj kopiadoj, ne troas,se oni konsideras la noblan celon.

Humuranguleto.

EN TOMBEJO

Homo metas bukedon da floroj sur tombon. Li vidas apude chinon kiu metas pelvon da rizo sur alian tombon.
- Chu vi kredas ke via mortinto venos mangxi la rizon?
- Kaj vi, rediras la chino, esperas ke via mortinto venos flari la florojn?

AKCIDENTO

Asekuristo al kliento: - “chu vi vere neniam suferis aùtomobilan akcidenton?” li demandis.- “Ne”, respondis lia kliento. - ...”nu bone, verdire mi ekkonis mian edzinon en garagxo”.

UTOPIO

- Kio estas utopia regno? - demandas lernejano.
- Estas lando kie oni vivas laù la konsiloj kiujn oni donas al proksimulo – mia filo.

Ne achetu sxatbeston,kompatu, adoptu forlasitan animalon !